

Naskiĝo de la svisa federacio, influo de la italo Pellegrino Rossi
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.02.21 & 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia.
Vi aŭdas la daŭrigon de nia prelegaro pri la formiĝo de la Svisa Federacio.

A.- Post la napoleona epopeo la svisoj, kiel la ceteraj eŭropanoj, revenis al siaj kutimoj. La kantonj subskribis novan defendan pakton en aŭgusto 1815, kiu renaskigis Ligon de absolute suverenaj ŝtatoj. Estis jura regreso. Sed la svisoj unuanime rifuzis konsideri la federacian konstitucion, kiun trudis al ili generalo Bonaparte por kunvivigi la svisajn kantonojn en respublika ŝtato.

Cl.- Ili neniigas tiun ŝtaton. Tamen la restarigo de la tradicia Ligo ne povis esti absoluta. La liberigitaj koloniaj teritorioj restis suverenaj kantonj, kies juran ekziston devis agnoski la 13 malnovaj kantonj. Nun la pakto ligas 24 ŝtatojn aŭ 20 kantonojn kaj 4 duonkantonojn. Multaj feŭdaj kutimoj reaperas kaj revigligas malnovajn konfliktojn.

A.- Revivante en Ligo de suverenaj ŝtatoj, la svisoj ekrimarkas la avantaĝojn de la bonaparta federacia konstitucio, kiu tamen funkciis bone malbone dum deko da jaroj. Pluraj meditadoj la vortojn de Napoleono:

Cl.- "La naturo igis vian ŝtaton federacio; voli spiti la naturon ne estas ago de saĝulo."

A.- Tiu malamata Napoleono ankoraŭ estis dirinta:

Cl. - "Pripensu bone la gravecon havi proprajn trajtojn; estas ili kiuj malhelpos vin tro simili al la ceteraj landoj kaj malebligos vian asimiliĝon."

A.- La rezisto kaj timo de la svisoj kontraŭ ties asimiliĝo fare de la najbaraj potencoj, fakte naskis la senton pri sviseco.

Cl.- La mankoj de la nova reĝimo estis ĉefe ekonomiaj. Pro la interkantonaj doganoj, kiuj restariĝis, la interkantonaj interŝanĝoj estis venenigitaj kaj malhelpataj. Kaj tiuj interŝanĝoj tendencis vigliĝis pro la kresko de la loĝantaro, kies industriiĝon favoris la brita blokuso kontraŭnapoleona.

A.- Sub la napoleona reĝimo organiziĝis la unuaj federaciaj festoj. Ekzemple en 1805 okazis en Unsprunnen apud Interlaken la unua kongreso de aipaj bovistoj dum lukto-konkurso. Ekde tiam ĉiujare la alpaj paŝtistoj emis renkontiĝi por novaj luktadoj. Iom simile la hodiaŭan mondon spirite unuigas la olimpikaj ludoj. La ŝtatanoj kunvivas la luktojn de siaj sportistoj. Kaj en nesportaj medioj ankaŭ sentiĝas la bezono renkontiĝi.

Cl.- En 1819 la studentoj fondis tutsvisan asocion kaj ekorganizis interkantonajn kontaktojn. La samon faris la sciencistoj kaj en 1822 la oficiroj. Do eĉ armeanoj sentis la bezonon je interkantonaj kunvenoj.

A.- En tiuj interkantonaj renkontiĝoj oni paroladis kaj ripetis la famiĝintajn dirojn de la bazela historiisto **Henrich ZSCHOKKE**:

Cl.- "Fariĝas evidente, ke la granda plimulto de la nacio pli kaj pli disiĝas de la plimulto de la kantonaj registaroj en sia evoluo kaj en siaj aspiroj. Dum la popolo emas pasie al unuiĝo de ĉiuj naciaj fortoj, la kantonaj registaroj sin reciproke forpuŝas kiel similaj polusoj por defendi siajn lokajn interesojn kaj sian sanktegan suverenecon."

A.- Fine en 1832 la Dieta decidiĝas ekstudi projekton de nova konstitucio federacia. Tiam aperas interesa homo, kiu fakte ne estas svizo. Li nomiĝas **Pellegrino ROSSI**. Li naskiĝis en **Carrare** (Italio). Politika rifuĝinto, li fariĝas en Ĝenevo la unua katolika profesoro en la Akademio Calvin. Lian elokventon ŝatas la ĝenevanoj. Tial li fariĝas ilia ambasadoro en la kunvenoj de la Dieta, kie li pledadas nelacigeble favore al starigo de federacia registaro, viva sintezo de unueco kaj diverseco.

Cl.- Nuntempe Eŭropo kaj la Mondo bezonus similan elokventulon por defendi la tezojn de la federistoj. Aŭskultu la dirojn de tiu **Pellegrino Rossi**. Tiam vi konstatos ilian daŭran aktualecon, se anstataŭ pensi pri Svislando de la komenco de la deknaŭa jarcento, vi pensas pri Eŭropo aŭ eĉ pri la Mondo fine de la dudeka jarcento:

A.- "Svislando, diras Pellegrino Rossi:

Cl.- Vi pensu Eŭropo aŭ la Mondo.

A.- "Svislando: Tiu vorto staras super niaj diversecoj lingvaj, kutimaj, religiaj kaj industriaj; tiu vorto, kun la idearo, kiu ĝin akompanas, flugas super niaj lokaj tradicioj, aŭ pli taŭge dirite, sorbas ilin en si mem. Nur ĝi povas esti por ni, en nia penso, la antitezon de la fremdeco. Estas ĝi, kiu impresas nin per neforigebla sigelo de komuna nacieco... Jes, la ideo pri komuna patrio ne estas fremda por ni; la sento pri tiu nacieco ekzistas en niaj koroj. Malgraŭ la asertoj de tiuj, kiuj ne komprenas nian modernan tempon, unu el la gloraj punktoj de nia epoko estas, ke tiu ideo akiris pli da neteco, ke tiu sento fariĝas pli energia."

Cl.- Elokventeco ofte uzas bildojn ne tre klarajn. Pellegrino Rossi esprimis sentojn per vortoj, kiuj tuŝas pli la koron, ol la racion. Patriotismo, ĝi estu tutsvisa aŭ tuteŭropa aŭ eĉ tutmonda, estas fenomeno pli religia, ol scienca. Tiom longe, kiam scienculoj, kaj intelektuloj provis demonstri la neceson de federigo por ia svisaj kantonoj, iliaj alvokoj restis seneĥaj. Pellegrino Rossi uzas alian lingvon pli sentimentalan. Lia alvoko estas aŭdata. Laŭ kaŭzo ekvenkas.

A.- Sed ne tuj. Pellegrino Rossi prezentis projekton de federacia konstitucio, kiu, kiel okazas ĝenerale en politiko, estis vigle rifuzita. Unuj riproĉis al tiu projekto tro respekti la kantonajn aŭtonomiojn kaj samtempe, aliaj argumentis, dirante ke tiuj aŭtonomioj ne estis sufiĉe protektitaj.

Ci.- Sed pro la obstino de Pellegrino Rossi tiu projekto devis esti detale trastudita en laborkomisiono nomita de la Dieta. Kiam subite en 1848 la svizoj devis redakti federacian konstitucion, ili ĉerpis ĉefe el la propono de Pellegrino Rossi, kvankam tiu italo ne plu vivis en Svislando. Fariĝinte estro de la pontifika registaro sub Papo Pio la naŭa, li estis en tiu jaro murdita en Romo.

A.- Povas eĉ esti, ke la foresto de Pellegrino Rossi dum la diskutoj favoris la objektivan analizon de liaj tezoj, kiujn novaj defendantoj povis pli libere diskonigi.

Cl.- La periodo inter la napoleona epopeo kaj la starigo de la federacia organiziĝo kovras tridekon da jaroj. Ĝi vidis ŝanĝiĝi ne nur la kutimoj. Dankal multaj civilaj konfliktoj: lokaj

militoj, vilaĝaj ribeloj, klasbatalaj luktoj, ekonomiaj bataloj, la kantonaj konstitucioj devis nepre reformiĝi. Estis vere la finiĝo de la feŭda epoko. Moderna Svislando povis naskiĝi. Ĝi estos federacia.

A.- Pri tio ni raportos la venontan semajnon.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andree GACOND pretas sendi la tekston de sia prelegaro pri la formiĝo de la Svisa Federacio al la geaŭdantoj, kiuj petos ĝin skribe. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*